

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3b/2007



La murojn de la luksa salono de la Nobelara domo ornamas la blazonoj de la finnaj nobelaj familioj. Raporto pri la jubilea festo sur p. 7-13.

Arta Lumo invitas, p. 3-5, 28-30

Simpozio kaj Aŭtunaj Tagoj, p. 22 ♦ Valamo-kursoj, p. 20

Muut lehdet satavuotisjuhlasta, s. 14

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

tuomo.grundstrom

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Mira Anonen, Karstulantie 8 E 70, 00550 Helsinki. ☎ 040 759 2184 ✉ mira.anonen@helsinki.fi

Olli Pajula, Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ 050 571 9224 ✉ olli.pajula@baanamail.fi

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ 040 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



Kun steloj en festivalo

Arta Lumo

La festivalo Arta Lumo invitas 27an de julio ĝis la 1a de aŭgusto al ĉarma ĉelaga urbo, Kuopio, en Finnlando, kie Esperanto-Asocio de Finnlando festas sian centjariĝon. La steloj de Arta Lumo abundas. La programo komenciĝas per **interkona vespero** vendrede (esperantokurso jam posttagmeze) kaj finiĝas fruposttagmeze merkrede. La aliĝkotizo inkluzivas ankaŭ lundan **saŭnoekskurson** al Rauhalahki (kun manĝo kaj programo).

Ni festas la multflankan kreaĵon esprimon, kiun ebligas Esperanto, originale kaj traduke, bilde, vorte kaj ĉiuforme inspirite de kunveno de amatoraj kaj profesiaj artistoj por ĝuigi la tutmondan kaj la lokan publikon.




Du francaj “spektaklofarantoj”: **Duoble Unu** (Fransŭaz Roŝet kaj Patrik Delabi).

Kaj ĉu vi revis pri monda vojaĝo pere de populara, bele kantita muziko? **Natalia Striĵnova** (en LODE 8-9/2005) kontribuos per tia estrada popo. Helpe de **Duoble Unu**, la du francaj “spektaklofarantoj” ni spertos kaj partoprenos teatron, dancon, ĵongladon kaj fabelrakontadon, plian mondan vojaĝon.

La juna talentulo **Esa Toivola** konatigos nin kun la sekretoj de la orgeno kies ludadon li instruas en la Sibelius-Akademio de Kuopio. En la moderna preĝejo de Puijo, kie ankaŭ eblas komuniki kun la orgenisto, li surbaze de himnoj prezentos improvizaĵojn.

Ĉu vi konas la kantelon? La nacia instrumento reprezentas ne nur la mitologian mondon de Kalevala sed ankaŭ la nuntempon. **Timo Vää-**



En la ekspozicioj de Arta Lumo troviĝos, interalie, fantastaj esperantistoj de Markku Sarastamo.

nänen, unu el la plej elstaraj kantelistoj en la mondo, malkaŝas novajn dimensiojn kunlabore kun dancistino **Päivi Järvinen**. La finnaj esperantistoj jam konatiĝis kun ilia kunlaboro en la 100-jariĝa festo la 28an de aprilo. Nun ili promesas novan travivaĵon.

Solo, Eduardo Vargas Gutierrez, elektromuzikos lumakompanite. **Patrik Austin** kun la chiam fresha **Dolchamar** ne informis ĉu li daŭre evitos supersignojn, sed li promesas novan sonon kaj malnovajn favoritojn.

Ni spertos ankaŭ gitaran muzikon kun **Vesa Pölkki**. Ni aŭdos specialan instrumenton, la naturan folion, kiun tre malmultaj kapablas ludi.

Inter la pintaj manifestacioj de nia festivalo estas la fantasta mondo de **Markku Sarastamo**, ekspozicio kun bildoarto, skulptaĵoj kaj rakontoj. Inter la ekspozicioj troviĝas ankaŭ la Esperantopostmarka kolekto de **Cao Pinaro**.

La **kinejo** kiun gvidas **Olli Pajula** montros interalie koloran filmon de Vilho Setälä pri kongresa vojaĝo 1955: Pilgrimo (nomo ankaŭ finlingve: Toivioretki) – por Arta Lumo prizorgitan kaj DVD-transmetitan de la Finnlanda filma arkivo, la fascinanta filmon “Kio estas sub la nuboj” kaj novajn esperantlingvajn kreaĵojn.

Interalie **Aleksander Korĵenkov** (ĉefredaktoro de La Ondo de Esperanto) kaj la esp-rimantino **Anja Karkiainen** konatigos al ni la misterojn de nia literaturo. Amuzaj kantoj kaj ludoj atendas la infanojn, kies programon kunordigas **Tuomo Grundström**.

En la **metiejoj** vi mem kreos arton kaj konatiĝos pli proksime kun diversaj aspektoj de kulturo. Jen kelkaj ekzemploj: Kreu palindromojn kun **Taneli Huuskonen**! Lerne pri neidentigitaj lumaj fenomenoj kun **Olli Pajula**! Konatiĝu kun cerbumiloj de **Kimmo Hakala**!

Jordan Slavejkov (Dany), juna bulgara reĝisoro, antaŭa prezidanto de la nacia junulara Esperantomovado, prezentos al ni Esperantan teatron kaj gvidos metiejon kies rezulton ni ĝuos dum la granda finalo.

La lunda ekskurso ebligas multflankan ripoz-



Vesa Pölkki estas gitaristo en Kuopio. En Esperantujo li estas plej konata pro la kunlaboro kun Anja Karkiainen. Ŝi verkis tekstojn, li la muzikon.

adon, kantadon kaj ludadon, saŭnumadon kaj naĝadon en bela naturo. Pliaj libere elekteblaj ekskursoj estas planataj, povas esti al ortodoksa muzeo Vesanto, Iisalmi kaj al la von Wright-parko.

Dum la festivalo eblas ankaŭ partopreni kurson de Esperanto por komencantoj kaj fortigi jamajn konojn.

La retpaĝo de Festivalo Arta Lumo troviĝas ĉe www.esperanto.fi. Vi ankaŭ povas peti la plej aktualan programon de la prezidanto, Anna Ritamäki (la festivala retadreso aŭ laŭ informoj sur p. 2, jen ankaŭ poŝtelefono 050-379 3146.)

La retadreso de la festivalo estas artalumo@esperanto.fi

Bonvenon!

**Aliĝilo sur paĝoj 29-30
Tranokteblecoj sur paĝo 28**

Opi esperantoa ja nauti kulttuurista!

Festivaali *Arta Lumo – taiteiden lumoa* kutsuu Kuopioon 27.7.–1.8, jossa Suomen Esperantoliiton 100-vuotisjuhlinta jatkuu. Ohjelmassa on n. 12-tuntinen kurssi aloittelijoille ja esperantoon voi tutustua myös näyteoppitunneilla. Kieltä voi tietenkin oppia myös osallistumalla festivaaleille.



Roska päivässä, vaikka esperantoksi

Esperanto ei muodosta kovin merkittävää kanavaa ihmiselle, joka haluaa tietoa maailman tapahtumista. Esperantonkielisiä lehtiä ja internet-sivustoja on kyllä paljon, mutta niitä tehdään usein kovin sisänlämpivässä muodossa: kirjoitetaan esperantoliikkeen omista tapahtumista, esperanton omasta historiasta ja kielellisistä kysymyksistä, siitä, miten esperantoa pitäisi kehittää. On joitakin poikkeuksia, kuten lehdet *Monato* ja *Kontakto*, joissa kirjoitetaan esperantoksi asioista esperantoliikkeen ulkopuolelta, mutta pääosan kansainvälisestä uutisvirrasta minäkin, aktiiviesperantisti, vastaanotan muilla kielillä. Esperantonkielisten lehtien pääasiana tuntuu yleensä olevan kertoa, kuinka monta esperanton harrastajaa missäkin kokoon-tui ja kuinka iloisessa hengessä *La Espero* taas laulettiin. Väistämättä niin on tässäkin lehdes-sä, vaikka olen päätoimittajana halunnut ja yrit-tänytkin hiukan muunlaiselle linjalle.

Www-sivuja on jo aika monella suomalaisella esperantoyhdistyksellä. Harvinaisempaa on esperantonkielinen sivusto, jossa kerrotaan muusta kuin esperantosta – esimerkiksi esperan-tonkielinen kotisivu yhdistyksellä, joka ei ole esperantoyhdistys. Tiedän vain yhden sellaisen suomalaisen yhdistyksen, Dodo ry., josta on esperantoksi luettavissa esittely osoitteessa <http://www.dodo.org/uutiset/esperanto.html>, ja sekin on itse tekemäni. Vapaassa internetin tietosanakirjassa wikipediassa, jonka löytää osoitteesta www.wikipedia.org, tai esperantoksi eo.wikipedia.org, on esperantonkielistä ma-

teriaalia jo melko runsaasti, mutta sielläkin se painottuu esperantoa itseään koskeviin asioihin.

Tänä keväänä Suomen Esperantoliitto sai Roska päivässä -liikkeeltä pyynnön kääntää Roska päivässä -kotisivu esperantoksi. Roska päivässä on suomalaislähtöinen liike, jonka ideana on vähentää ympäristön roskaantumista kantamalla joka päivä yksi maahan heitetty roska jäteastiaan. Liike on saanut kannattajia ympäri maailmaa ja sen kotisivu oli ennen esperantoa jo kuudellatoista muulla kielellä.

Roska päivässä -käännös nimellä *Movado "Ruberon ĉiutage"* saatiin aikaan muutamassa viikossa ja on nyt luettavissa osoitteessa <http://koti.welho.com/jpeltora/roskaesperanto.htm>

Me esperantistit emme varmaankaan voi olettaa, emmekä varsinkaan vaatia, että kaikki yhdistykset ja muut organisaatiot haluaisivat nettiin itsestään esperantonkielisen esittelyn. Eihän välttämättä ole yhdistykselle itselleen edes eduksi, että siitä on esittely netissä esperantoksi, jos kukaan yhdistyksen hallituksen jäsenistä ei edes ymmärrä esperantoa. Tärkeintä kuitenkin on, että olemme ainakin valmiita tekemään esperantonkielisen käännöksen mistä tahansa aiheesta mistä sellaista pyydetään.



Ĉu vi rimarkis: finn-devena movado "Ruberon ĉiutage" nun havas ttt-paĝon en Esperanto:

<http://koti.welho.com/jpeltora/roskaesperanto.htm>

Tio estas farita laŭ peto, kiun la iniciatintoj de la movado sendis al EAF.

Mikko Mäkitalo

Vizito de UEA-prezidanto dum la jubilea semajno

Prezidanto de Universala Esperanto Asocio (UEA) Renato Corsetti vizitis Finnlandon 25.-29.4.2007 por esti la festparolanto en la 100-jara jubilea festo de Esperanto-Asocio de Finnlando. Antaŭ kaj dum la festotago li havis eblecon konatiĝi kun nia lando kaj kun finlandaj esperantistoj.

UEA-prezidanto Corsetti estis akceptita en la flughaveno de EAF-vicprezidanto Päivi Saارين kaj sekretario Tiina Oittinen. La frato de Päivi afable veturigis la grupon al la oficejo de EAF, kie Renato tranoktis dum la vizito.

En la programo de Renato estis du prelegoj, ambaŭ aranĝitaj lige al la temo de la jubilea jaro *Pluraj lingvoj praktike* (Käytännön monikielisyys).

Merkrede la 25an de aprilo Renato konatiĝis unue kun nia ĉefurbo. Post mallonga vizito en la vendohalo kaj vendoplaco de Hakaniemi Tiina promenis kun li al la urbocentro. Survoje li vidis la fervojan placon kun ĉirkaŭantaj konstruaĵoj. Poste okazis vizito al Akademia librovendejo en P. Esplanadi 39, la naskiĝloko de EAF. En la placo de la senato la duopo renkontiĝis kun Harri Laine, kun kies aŭto eblis fari etan rondveturon kaj vidi eĉ UK-ejon de 1969, Dipoli, en Espoo.

Merkrede je 16a okazis en Helsinko la unua el la prelegoj, kiu estis aranĝita kunlabore kun fako de ĝenerala lingvistiko en Universitato de Helsinko sub titolo *Lingvoakiro de infanoj: sen-skola aliro kun materialo el la natura akirado de Esperanto* (Koulukunnista riippumaton lähestymistapa lapsen kielenomaksumiseen). La lingvosciencan prelegon interpretis Jouko Lindstedt. Ĉeestis 20 partoprenantoj, inter ili ankaŭ ne-esperantistoj.

Ĵaŭde 26.4. Renato estis intervjuita en Radio Suomi (programo Ajantasa) dum gazetara kon-

ferenco de EAF en Universitato de Helsinko. La alia intervjuato estis EAF-prezidanto Anna Ritamäki, kiu ankaŭ interpretis. Posttagmeze Renato kun Anna kaj Tiina vizitis la jarkunvenan seminarion de UN-asocio kaj iom poste li kaj Tiina krome vizitis oficejon kaj bibliotekon de Itala kulturinstituto en Helsinko. Vespere Renato havis eblecon babili kun FEJO-anoj en la oficejo, kie ili aranĝis novulan vesperon.

Vendredmatene, la 27an de aprilo, estis en programo de UEA-prezidanto honoriga vizito al tombo de la unua EAF-prezidanto Nino Runeberg. Ĉeestis kun li Anna Ritamäki, prezidanto de EAF kaj Jukka Pietiläinen, prezidanto de EKH kaj ankaŭ Maria Runeberg, la nepino de Nino Runeberg.

Tuj post la tombeja vizito Renato vojaĝis kun Jorma Ahomäki al Turku. En la ĉefbiblioteko de Turku okazis la dua prelego kun titolo *Italoj italas* (Italiaa italialaisittain), interpretisto ĉi-foje estis Jorma Ahomäki. Ĉeestis denove 20 partoprenantoj, ankaŭ ne-esperantistoj, kiuj ĝuis la viglan prezentadon kaj aktive starigis demandojn. Antaŭ komuna vespermanĝo kun EST-anoj Renato povis vidi la lokan ZEOn, poemon de Wäinö Aaltonen, kiu krom multaj aliaj lingvoj estas hakita ankaŭ esperante sur muro de WA-muzeo. Reen al Helsinko li vojaĝis kun Päivi Saارين.

La festotago, 28.4.2007, komencis per konatiĝo de la festejo, Nobelara domo, sub gvido de esperantlingva ĉiĉerono Ulla Salonen. Antaŭ la festo li povis saluti kaj interparoli kun aliaj gastoj, kiuj venis festi el tuta Finnlando kaj eĉ de eksterlande. Inter la eksterlandaj gastoj estis i.a. reprezentantoj de Centra Oficejo kaj esperantistoj el Svedio, Estonio kaj Latvio. La festotago finiĝis kun bankedo, kies etoso estis festa kaj ĝoja kun spontanaj paroloj de la gastoj. ▷

Cent jaroj festumitaj

Oni ne povas diri, ke la Esperanto-kvizo estus tirinta enorman atenton inter promenantoj en Helsinko la 28-an de aprilo. Bela, kvankam tamen malvarmeta, printempa vetero regis la urbajn stratojn, frumatene kvietajn pri homoj de la nur iom post iom vekiganta urbo. Averaĝa promenanto sur la strato apenaŭ estis konscia, ke okazas grava datreveno de la movado por la internacia lingvo. Kelkaj esperantistoj tamen cirkuladis kaj serĉis la kvizajn respondojn.

En la Nobelaran domon kolektiĝis iom pli ol cent esperantistoj kaj esperanto-simpatianoj por jubilei la centjariĝon de EAF. Ĉe-estis ankaŭ la

prezidanto de UEA, Renato Corsetti, kiu en sia parolo memorigis, kiel Esperanto formis ponton inter homoj en la tempo, kiam la fera kurteno dividis la mondon, kaj kiel Esperanto ĉiam subtenis la kontribuon de malgrandaj lingvaj regionoj en la mondan kulturon. Sian saluton sendis finna ministro pri kulturo Stefan Wallin, kun atentigo pri kelkaj finnaj verkoj kaj verkistoj, kiuj per Esperanto povis atingi konatecon eksterlande.

Ni esperantistoj ne estas multaj, sed la festo kun muzikaĵoj kaj aliaj artaĵoj brave daŭrigis la esperantistan etoson, kiu fidele portas la ideon

al novaj jarcentoj. Se ne multaj preterpasantaj homoj sciis, kiu strangaĵo estas la verdstela flago ĉe la pordo de la Nobelara domo, la centjariĝo de EAF ne tamen restis tute sen rimarko. Multaj finnaj gazetoj skribis ja ian artikolon pri la centjara organizo, kiel ni povas en la "Muut lehdet" -artikolo de tiu ĉi gazeto vidi.

Mikko Mäkitalo



La kvizpromeno strebis videbli surstrate, kaj almenaŭ iuj vizitis la rolfigurojn por serĉi ĝustajn respondojn. (foto: Andrei Dumitrescu)

▷ Ni en Finnlando ĝojis, ke ni povis akcepti la prezidanton de UEA kiel nia honora gasto. Krome estis afable konatiĝi kun li persone. Ankaŭ Renato ĝuis la viziton kaj dankis nin tuj post la vizito retroŝte jene: "Mi kaptas la okazon por danki al ĉiuj suomaj/finlandaj esperantistoj, kiuj bonvolis helpi min dum mia restado en ilia lando. La helpo estis tre granda kaj ĉefe oni suk-

cesis klarigi al mi la fenomenon Finnlando, kiu estis ĝis nun sufiĉe mistera por mi. Mi ne nur konas nun la historion de Finnlando kaj la kialojn malantaŭ tiu historio, sed eĉ konscias ke "alko" kaj "boaco" estas du malsamaj bestoj (mi ne rakontas tion al italoj, ĉar ili pensus, ke mi estas freneza). Estis tre bele! Dankon! Renato"

raportis Tiina Oittinen



La jubilea skatolo, kiu dum lastaj monatoj cirkulis Finnlandon inter la lokaj Esperantaj kluboj, transdoniĝis el manoj de Steleto-anoj al la prezidanto de EAF.



Tõnu Hirsik prezentis salutojn el Estonio.



Dancistino Päivi Järvinen rivelis el la jubilea skatolo iom surprizan enhavon.

Kvizpromeno logis la jubileantojn al la urbo

La historia kvizpromeno kontribuis al la jubilea etoso allogante festantojn al la urbo por la antaŭtagmezo de la jubilea tago. Krome ĝi estis plia kaŭzo menciis Esperanton en amaskomunikiloj. La jubileon menciis interalie plurfoje dum la tago la loka radio Ylen Aikainen, kiu intervjuis la antaŭan tagon la prezidanton de EAF kaj la sekvatagan rolulon de Nino Runeberg en la Akademia librejo. Tie vendiĝis Esperantolibroj honore al la tiuadresa fondiĝo de la asocio. Nun la vendejo havas en sia stoko kelkajn vortarojn kaj *Egaleco kaj paco* -lernolibrojn. Alia grava kaŭzo ekfesti antaŭtagmeze estis la dufoja ĉiĉeronado en la nobelara domo, kiun realigis Ulla Salonen. En la domo eblis legi gazetajn eltondaĵojn, ankaŭ malnovajn. Krome eblis rabate lunĉi en restoracio montrante anoncon de la jubilea numero, kiun ricevis krom la abonantoj ankaŭ ĉiu respondinto de la kvizo.

Ne multaj eksteruloj partoprenis la historian kvizon, sed multaj homoj vidis niajn historiajn personojn, speciale tiujn en la centro kaj ĝi donis tri novajn nomojn por la E-ku-listo (Esperantokursoj). La lokoj en Kallio/Berghäll estis pli Esperantospecifaj, sed la vizitantoj ne estis multaj. Unu grava celo estis ankaŭ konatiĝi kun gravaj personoj de la Esperanta historio. La subaj informoj donas iom da informoj pri ili, sufiĉe por doni la respondojn al la demandoj. La programo estis realigebla pro bonvolema helpantaro.

Inter la 27 respondintoj premiojn ricevis Jukka Laaksonen (9 korektaj respondoj, ledodorsa numerigita Kalevala, lotumita en la festo), Marjatta Niemi (10, poŝtmarkoj) kaj Hannu Meriniemi (9, Kie boacoj vagadas).

1907: Nino Runeberg, unua prezidanto de EAF 1907-19 jam en 1905 partoprenis la unuan Universalan Kongreson (UK) de Esperanto en Boulogne sur Mer. Taneli Huuskonen rakontis pri

li ĉe Norda Esplanado 39, kie EAF fondiĝis la 28an de aprilo 1907. (Pri Runeberg estis artikolo en EF 1/2006).



1919: Heino Pätälä estis inter la unuaj pastroj kiuj gvidis meson en esperanto. Informon pri li oni trovis apud la preĝejo de Kallio kie li gvidis meson i.a. en 1919 lige al la jarkunveno de EAF. Same li gvidis tie la meson dum la kongreso 1922.

1922: Albin Sandström estis prezidanto de LKK por UK en Helsinko. Pri la kongreso kaj Uusi Suomi kaj Suomen Sosialidemokraatti raportis ĉiutage en esperanto. Lin prezentis Mikko Mäkitalo apud la Nobelara domo, kongresejo en 1922. (Pri Sandström en EF 5/2006) En la domo troviĝis portreto de alia tiama aganto, Vilho Setälä (pri Setälä en EF 3/2006).


1935: Hugo Salokannel estis prezidanto de EAF 1925-35. La lastan jaron li fondis la finnan sektion de la Kristana Esperantista Ligo, KELF. Hugo estis staciestro en multaj finnaj lokoj kaj fondis en preskaŭ ĉiu loko esperantoasocion. Li fondis ankaŭ asociojn por fervojistoj, abstinuloj kaj nefumantoj. Kiel Hugo rolis dum la tago Börje Eriksson, nature ĉe la stacidomo.



1948: Tyyne Leivo-Larsson elektiĝis parlamentano la unuan fojon 1948, sed nur post sia

ambasadora tempo ŝi en la jaro 1967 proponis esperantokurson por finnaj parlamentanoj. La informon pri ŝi oni trovis apud la memorŝtono de J. K. Paasikivi, prezidanto dum la unua parlamentoperiodo de Tyne. (Pri Leivo-Larsson en EF 6/2006)

1959: Eija Salovaara en 1959 vagadis en Laponio. Pri tio ŝi rakontis en la libro “Kie boacoj vagadas”. Eija estas reprezentanto de finna literaturo originale en esperanto. La plej konata finna tradukita libro estas “Kalevala”, tradukita de Joh. Edv. Leppäkoski. Apud la monumento de Kalevala pri esperanto rakontis Paula Niinikorpi.



Eija Salovaara sur afiŝo tenata de Paula Niinikorpi.


1969: Irja Klemola estis la unua virina prezidanto de EAF (1966-73) kaj estis la unua skoltina nacia reprezentanto de Skolta Esperanto-Ligo (de 1975), sed prezidanto de UEA ŝi ne estis. Kiel Irja Klemola survoje al urba akcepto en Kallion Virastotalo okaze de UK 1969 oni povis vidi Raita Pyhälä bele vestita en la nacia kostumo de Somero. (Pri Klemola en EF 4/2006)



1975: Oskari Lehtivaara estis prezidanto de EAF de 1975 ĝis 1985, sed plej longe li agis en la organizo de blinduloj. Li estis estrarano de Steleto dum 50 jaroj. Pri lia agado oni povis lerni apud la blindula domo helpe de i.a.

Arvo Karvinen kaj lia filo Jouni Lehtivaara.

1980: Tuomo Grundström estas fonda membro de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo, FEJO kaj prezidanto de LKK de la Internacia Junulara Kongreso, IJK en Raŭmo 1980, kie li en la moderna lernejo ofte devis atentigi “Ne tuŝu la teknikaĵojn!”, kion li ankoraŭ ofte ripetas. Li reprezentis sin mem ĉe la aŭtobusa atendohalo, de kie iras aŭtobusoj al Raŭmo.



1995: Jukka Pietiläinen estis prezidanto de EAF kiam Finnlando gastigis UK:n en Tampere 1995. Al UK tiam aliĝis 2443 personoj. Jukka mem troviĝis en la oficejo de EAF, kiu translokiĝis al la nuna loko post la kongreso.

Ni aperigas la fotojn de tiuj ne prezentitaj en apartaj historiaj artikoloj. La artikolserio pri gravaj historiaj esperantistoj troviĝas ankaŭ ĉe www.esperanto.fi.



Honoron al antaŭaj generacioj

La prezidanto de EAF kun la prezidantoj de UEA kaj Esperanto-Klubo de Helsinki kaj Maria Runeberg, nepino de Nino Runeberg, vizitis la tombon de la unua prezidanto de EAF en la tombejo de Hietaniemi/Sandudd la vendredon antaŭ la festotago, ekzakte 100 jarojn post la unua kunsido, kiu kondukis al la fondiĝo de EAF sekvatage.

La prezidanto de EAF prezentis trilingvajn salutvortojn. Ŝi rememorigis ke Nino Runeberg laŭ la mortoanonco ne deziris florojn je sia tombo kaj ŝi klarigis ke EAF volas honorante la unuan prezidanton de EAF kaj EKH honori ĉiujn agantojn por Esperanto de la antaŭaj generacioj, tiujn kiuj povas ĉeesti la festadon nur en niaj memoroj.

La delegacio promenis en la tombejo kaj trovis ankaŭ la familian tombon de Walter Runeberg, patro de Nino, kaj la tombon de Vilho Setälä, antaŭa prezidanto de EAF. La sekvan tagon Maria Runeberg partoprenis la feston en la Nobelara domo kiel honora gasto.



*Sur la tomboŝtono legeblas interalie: “Dr. Phil. Nino Runeberg, * 27.V.1871 † 15.II.1934 och hans hustru Mimmi”. La edzino mortis 1964. La framazonaj fratoj starigis la ŝtonon: “Frimurarbröder reste vården”*

La delegacio ĉe la tombo: La prezidantoj Renato Corsetti de UEA, Anna Ritamäki de EAF, Jukka Pietiläinen de EKH kaj la nepino Maria Runeberg.



Gratulojn al 100-jara EAF

Esperanto-Asocio de Finnlando ricevis multajn salutojn okaze de la 100-jariĝo 28.4.2007. La salutoj venis aŭ perletere aŭ per retpoŝto antaŭ, dum kaj post la jubilea festo en la Nobelara domo, Helsinko. Koran dankon al ĉiuj gratulantoj kaj salutantoj, ankaŭ al tiuj, kies nomoj de iu ajn kialo mankas el tiu ĉi listo.

De la ŝtato venis oficiala saluto al la festo, salutanto estas Stefan Wallin, ministro pri kulturo kaj sporto de Finnlando.

Membroasocioj de EAF salutis kaj gratulis pere de la jubilea libro en la jubilea skatolo, kiu ĉirkaŭis la tutan landon.

Salutantoj el Finnlando en la festo

Por Esperanto-klubo de Helsinko salutis Jukka Pietiläinen.

Esperanto-societo en Turku salutis pere de poemo el Kanteletar "Tehkäämme iloinen ilta" (Ni faru la vesperon gaja) trad. Paula Harju. La poemon legis en la festo Leena Tiusanen finne kaj Anna-Liisa Ali-Simola esperante.

Esperanto-societo Antaŭen el Tampere salutis pere de poemo "Jam jarcenton" de Anja Karkainen, legita de Jukka Laaksonen.

Persone salutis Andrej Teräväinen el Lahti kaj deklamis sian poemon "Ne vivas homo nur". Veikko Mäki-Luopa el Helsinko salutis donacante videofilmojn de la festo. Krome, fine de la historia parado, "Albin Sandström" laŭtlegis sian propran personan salutkarton presitan antaŭ 100 jaroj: "Per Esperanto – por Esperanto. Ĝojan Kristnaskan feston kaj sukcesan novjaron 1907 deziras tutkore al Vi Albin Sandström"

Eksterlandaj gastoj kaj donacoj en la festo

Por Universala Esperanto-Asocio salutis festparolante Renato Corsetti. Antaŭ la gratula tosto li transdonis la donacon de UEA KD:ojn "Du paroladoj de Ivo Lapenna", disko I kaj II, festparolo. Por la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio salutis Clay Magalhaes.

Por estonaj esperantistoj salutis Tõnu Hirsik (venis ankaŭ gratulkarto el Estona E-asocio)

Ankaŭ Peeter Aitai, estono loĝanta en Britujo, salutis.

Por Latvia Esperanto-Asocio salutis Biruta Rozenfelde, kiu donacis du librojn: Antaŭen (poemaro de Janis Rainis), kaj 80 rakontoj pri la eterne juna 800-jara Rigo (kompilis V. Teterre).

El Svedujo salutis Soile Lingman, prezidanto de Esperantoklubo de Stokholmo.

Retmesaĝoj kaj leteroj

Rete salutis Ileana Schrøder, prezidanto de Dana Esperanto-Asocio, Ulla Luin el Svedio, Atilio Orellana Rojas el Nederlando kaj Claude Nourmont, vicprezidanto de UEA & estrarano pri kulturo, kongresoj, edukado. Pliaj retsalutantoj estis Jawaïd Eahsan el Pakistano, Iván Mättig C., UEA-Delegito en Santiago, Ĉilio, Zoran Ĉiriĉ el Serbio kaj same el Serbio Boriša Miliĉević, direktoro de Esperanto-Instituto en Novi Sad.

Plej kore el Pollando salutis rete Barbara + Gabi (Barbara Pietrzak, emerita ĉefo de Esperanto-redakcio de Pola Radio kaj Gabi Kosiarska, redaktoro de esperanto-redakcio de Pola Radio) kaj krome la veterana redaktoro Andrzej Pettyn. El Pollando ankaŭ salutis Georgo K.

Sincerajn gratulvortojn okaze de la centjariĝo sendis rete Koffi D. (Gbeglo Koffi) el Togolando.

Suomen YK-liitto / UN-asocio de Finnlando sendis gratulelegramon 28.4.2007, kiu atingis nin post la festo.

*Ankoraŭfoje koran dankon pro
viaj kontribuoj al nia jubilea tago!
Estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando*

Satavuotias pääsee lehtijuttuihin

Satavuotias yhdistys on vähän samanlainen kuin satavuotias ihminen. Lehdet kirjoittavat molemmista, ja jos ne ovat merkittäviä, molemmista kirjoitetaan myös valtakunnallisesti.

Hufvudstadsbladet kirjoitti otsikolla ”Esperanto vitas” via nätet’ EAF:n 100-vuotisjuhlasta, joka pidettiin Ritarihuoneella täsmälleen samana päivänä kuin se perustettiin. HBL:n mukaan 1920-luvulla oli kielen kultaiset vuodet Suomessa. Juttu julkaistiin 29.4.2007 ja siinä haastateltiin Jukka Laaksosta, joka iloitsi, että esperanto on saanut potkua kansainvälisesti internetin avulla. Kieli kiinnostaa uusia ihmisryhmiä Afrikassa, Aasiassa ja Etelä-Amerikassa. Helsingin yliopistoon on perustettu esperantoryhmä.

”Melkoinen osa heistä, jotka osaavat esperantoa, ei kuitenkaan kuulu järjestöihin”, sanoo Jukka ja kuvaa kieltä käytännölliseksi kakkoskieleksi. Esperantistit ympäri maailmaa muodostavat verkoston, jossa he auttavat turisteja tai työmatkalaisia.

Hufvudstadsbladet kertoi myös ennen juhlapäivää järjestetystä esperantonkielisestä Ritarihuoneen esittelystä, josta vastasi Ulla Salonen. Jutun kuvituksena oli henkilökuva Jukka Laaksosesta ja tilannekuva Ritarihuoneella tutustumiskierrokseen osallistuvista ihmisistä.

Jo 27.4. Salon Seudun Sanomat julkaisi jutun, jossa esiteltiin Salon Esperantoseuran toimintaa sekä EAF:n 100-vuotisjuhlaa. Salon kerhon puheenjohtaja Eero Saari esitteli kuvia esperantomatkoiltaan maailmalta ja Anna Ritämäki kertoi tutustumisestaan esperantoon ja esperanton synnystä sekä käytön periaatteista.

Kielen perustaja L.L. Zamenhof julkaisi 1887 pienen kirjasen, jossa käytiin läpi sanastoa ja sääntöjä sekä julkaistiin pari Zamenhofin runoa.

Annan mukaan juhluvuoden teema on kommunikaatio, mutta kyse ei ole vain teknisestä välineestä, vaan myös kulttuurin kielestä. Kansainvälisyys, puolueettomuus, tasa-arvo ja kielellinen helppous ovat tärkeitä kielessä. Anna haluaisi myös yliopistotasosta opetusta esperantosta, ja toivoi, että harrastajien määrä kasvaisi, heitä tarvitaan. Jutun valokuvassa olivat Eero Saari ja Anna Ritämäki.

Lappeenrannassa ilmestyvässä Kaakkois-Suomen Sanomissa oli juttua Lappeenrannan esperantokerholaisista, siitä, miten Zamenhof kehitti kieltä ja miten se tuli Suomeen. Esperantoliiton 100-vuotisjuhlaan liittyen järjestö kierrättää juhlalaatikkaa ympäri Suomea. Siihen kokoaivat kunkin pysähdyspaikan esperantistit valokuvia ja tekstejä, jotka liittyvät heidän toimintaansa. Lappeenrannassa laatikkko oli maaliskuussa ja jatkoi sieltä Kotkaan EAF:n talvipäiville.

Lappeenrannassa esperantoa on harrastettu 1920-luvulta lähtien. Juha Pyykkönen ja Aira Koivumäki ovat harrastaneet sitä yli 50 vuotta. Airan isä osasi myös kieltä, vaikka häneltä Aira ei sitä oppinut. Brasiliassa syntynyt Marli Hyrylä piti kieltä helppona portugalia puhuvalle henkilölle.

Parasta kielessä on kansainvälisyys, ja yksi apuväline siinä on Jarlibro. Sen avulla saa tietoja muissa maissa asuvista esperantisteista. He auttavat mielellään turisteja kotimaassaan. Muita Lappeenrannan esperantisteja olivat Jorma Toropainen, Maire Paarmo sekä Irja Miettinen.

Kuvituksena oli valokuva, jossa lappeenrantalaiset olivat tutkimassa juhlalaatikon sisältöä, Urho Salinin esperantonkielinen postikortti tekstipuolelta vuodelta 1923 sekä kuva esperantoäänitteen kirjoitetusta sisällysluettelosta.

”Maailman helpoin kieli on yhä helpompi” otsikoi Aamulehti 27.4.2007 juttunsa esperantosta. Jutussa haastateltiin EAF:n puheenjohtaja Anna Ritamäkeä. Hänen mukaansa siitä huolimatta, että sekä Suomessa että maailman Esperantoliiton jäsenmäärä on vähentynyt, esperantoa puhutaan entistä enemmän. Se on matkustelun ja internetin ansiota.

”Kieli on helppo oppia, kun sen säännöt ovat selkeät. Uusia ilmaisuja voi keksiä itse.”

Anna opetteli kielen äitinsä kanssa Kieku ja Kaiku -oppikirjasta. Kieli kuulostaa italialta, mutta kielioppi ja sananmuodostus on täysin omaperäistä. Jutussa mainitaan Antaüenin järjestämä Esperanto-näyttely Tampereen Metso-kirjastossa sekä EAF:n ja Antaüenin www-sivujen tiedot.

Aamulehdessä esiteltiin myös esperanton kieliset iskurepliikit tuttavuuden tekoa varten: Vi belas kiel printempo, Ĉu vi ofte venas ĉi-tien? Vi aspektas neniom pli ol 50-jara, Ĉu al ni au al vi? Mi estas bonenspeza kaj mi posedas velboaton.

Lestijoki-lehdessä kirjoitettiin Kannuksen kirjastossa pidettävästä Esperantonäyttelystä, jonka pystyttäjäksi oli Raita Pyhälä. Näyttely on samaan aikaan, kun EAF täyttää 100 vuotta. Yhdistyksen perustamisen aikoihin olivat aktiivisesti mukana Kannuksen silloinen asemapäällikkö Gustaf von Numers, kuten myös pitäjässä proviisorina toiminut Augustinus Lauren.

EU:ssa voisi käyttää esperantoa, ja tulkkauksesta säästyvät varat voisi suunnata muualle, arveli Raita. Esperantistien matkapalvelun avulla kielen harrastajat voivat asua muissa maissa paikallisten esperantistien seurassa.

Sisä-Savon Sanomissa 17.4.2007 Suomenjoella kirjoitettiin alueen kieltenopiskelusta. Kansalaisopiston kieltenopettajat kiersivät esittelemässä opiston kielivalikoimaa ja -opetusta alueen neljässä kunnassa. Jutussa esitellään unkarilainen Csanyin perhe, jonka Arpad-isä osaa esperantoa, samoin kuin Kimmo Hakala, joka oppi kielen Helsingissä ja hurautti siihen Puo-

lassa UEA:ssa. Vesannon kunnassa kyseltiin alustavasti, löytyisikö esperantosta kiinnostuneita niin paljon, että voitaisiin perustaa opiskelijaryhmä.

Raita Pyhälän kirjoittama kaksisivuinen artikkeli ”Sata vuotta esperantoa” ilmestyi Kajastus-lehdessä numero 2/2007. Lehti on Näkövammaisten kulttuuripalvelu ry:n julkaisema ja ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Artikkelissa käydään läpi kattavasti, lyhyesti ja napakasti esperanton historia Suomessa, näkövammaisten esperantoharrastus, kielen käytön mahdollisuudet tänä päivänä eri medioiden avulla ja kansainvälinen toiminta.

Esperanton historiasta Suomessa kerrotaan kielen esittely täällä, ensimmäiset harrastajat ja yhdistykset, oppikirjojen painaminen, kansalaisodan jälkeisen sisäpoliittisen tilanteen vaikutus, 20-luvulla syntyneet kieliyhdistykset ja opiskelumahdollisuudet. Toisen maailmansodan jälkeen englannin ylivalta vähensi kielen käyttöä myös Suomessa. Lopuksi on tiivis kielellisten periaatteiden esittely sekä nykyiset opintomahdollisuudet.

Kauppalehti Option erikoisnumerossa ”Makujen maailma” 23.3. esiteltiin Tukholmassa, Östermalmilla, avattu Esperanto-ravintola, jonka nimen perustajakaksikko on ottanut siksi, että he julistavat keittävänsä esperantoksi, universaalilla makujen kielellä. Päämääränä on luoda unelmia lautaselle häivyttämällä ruuan kotimaa, mutta jättämällä siihen jotain tuttua.

”Tahdomme kokata esperantoa ruokatermein ja niin se on edelleen. Kaikki mitä teemme, menee esperantofiltterin lävitse”, sanoo Sayan Isaksson, toinen perustajista.

Hufvudstadsbladetin mukaan (25.3.07) Esperanto-ravintola on saanut Michelinin yhden tähden osoituksena korkeatasoisesta ravintolasta.

Suomen Esperantoliiton 100-vuotisjuhlasta oli lyhyt uutinen ruotsinkielisessä Scoutpostinissa nro 2/2007. Juhlapäivä oli partioviikolla, ja Esperantopartiolaiset lupasivat lahjoittaa oppikirjansa ”ĵamborea lingvo” niille vähintään ▷

Esperanto rekomendita al lingvoinstruistoj

En la nova numero (4/2007) de *Tempus*, gazeto de la asocio de finnlandaj lingvoinstruistoj, la kolumnisto Kaarlo Voionmaa skribas kun la rubriko “Tarvitaanko keinokieliä?”, “Ĉu oni bezonas artefaritajn lingvojn?”

Voionmaa estas docento pri la finna kiel fremda lingvo en la Universitato de Oulu. Li loĝas en Gotenburgo, Svedio.

Laŭ Voionmaa, instruistoj de naturaj lingvoj eble taksas artefaritajn lingvojn senutilaj, ĉar estas jam multo da lingvoj. La problemo tamen estas komunikado kun alilingvaj homoj: ĉu ni uzu unu el la grandaj lingvoj, Voionmaa demandas. Kvankam EU propagandas por plurlingveco, la ĵurnalo Göteborgs Posten recente raportis, ke la angla lingvo estas senoficiale fariĝanta la lingvo de EU.

Voionmaa konstatas, ke la celo de niaj lernejoj kompreneble estas garantii, ke la lernantoj atingos sufiĉe altan scipopon pri la angla lingvo. La afero tamen ne estas findiskutita antaŭ ol la demando pri lingva egaleco estas solvita. Egalecon ne reprezentas tio, ke la grandaj lingvoj de EU transmarŝas la malgrandajn. Voionmaa

citas la manifeston de Prago kiel proponita solvo: Esperanto, kiu estas pli facile lernebla lingvo, agus por pli demokratia mondo. Voionmaa konstatas, ke li mem subskribas tiun penson, kaj ĝi estis unu el la kialoj, pro kiuj li mem lernis Esperanton. La kroma utilo estis tio, ke estas esperantoparolantoj ĉie en la mondo.

Se tio ne konvinkas lingvoinstruistojn, Voionmaa proponas ke oni pripensu la pedagogian valoron de la artefaritaj lingvoj. Lernado per ludado: infanoj kaj gejunuloj povus krei sian propran lingvon kaj tiel ili malkovrus la veran karakteron de homa lingvo.

Por iri al la mondo de lingvokreantoj Voionmaa proponas la adreson www.conlanger.com; por Esperanto: www.esperanto.fi.

La gazeto *Tempus* aperas 8-foje jare. Ĝin publikigas la asocio de la finnlandaj lingvoinstruistoj, SUKOL (Suomen kieltenopettajien liitto). Membroasocioj de SUKOL estas tiuj de la instruistoj de la angla, hispana, finna, itala, franca, sveda, germana kaj la rusa lingvoj.

Patrik Austin

▷ viiden partiolaisen ryhmille, jotka ilmoittautuivat EAF:n päiville. Ohjelmasta mainittiin kaupungilla toteutettu esperantotietokilpailu liiton historiaan liittyvien henkilöiden reinkarnaationa, jälleensyntymisenä.

Iisalmen Sanomien uutisessa 22.2.2007 kerrottiin juhluvuodesta ja juhlalaatikon käytöstä tervehdyksien keräämiseen. Kieli on kansainvälinen yhteiskieli, joka on kehitetty 1887 kieliprojektin pohjalta. Jutussa mainitaan EAF:n

jäsenjärjestöt sekä jäsenmäärä, noin 400 henkilöä.

Tamperelainen-ilmaisjakelulehti uutisoi 18.4. Metso-kirjastossa Tampereella järjestetyn ja esperantoa esittelevän näyttelyn, joka järjestettiin EAF:n 100-vuotistaipaleen vuoksi. Aiheena oli EAF:n historia ja esperantotoiminnan historia Tampereella.

Jukka Noponen

La angla ne venkis

Male ol oni eble povis atendi, la angla ne venkis en la ĉi-jara kant-konkurso de Eurovision. Inter la pintaj kvin kantoj nur du estis en la angla: la kantoj de Rusio kaj Turkio. La gajninta kanto de Serbio estis kantita en la serba, la duan lokon okupis Ukrainio, kies kontribuo ne estis en iu rekonebla lingvo, kaj la kvinan lokon okupis la propralingva kontribuo de Bulgario.

Almenaŭ same interesa kiel la lingva bilanco de la konkurso estis la kultur-geografiaj trajtoj, kiuj ĉi-jare eble estis pli klare rekoneblaj ol iam antaŭe. Laŭ la distribuo de la plej altaj poentoj rekoneblas ia kerna nord- kaj okcidenteŭropa kultura kampo, kiu klare apartiĝas de la sud-orienteŭropa direkto. Ene de ambaŭ tiuj landogrupoj, oni ĉefe voĉdonas por la anoj de la sama grupo, kun kelkaj facile klarigeblaj esceptoj.

Ekzemple, Germanio ĉiam donas altajn poentojn al Turkio, ĉar en Germanio loĝas multaj turkoj. Kaj eble pro simila kialo la kanto de Rusio ricevis 12 poentojn de Estonio. Aliflanke la eternaj malamikoj Turkio kaj Grekio ne kutimas doni multajn poentojn unu al la alia, kvankam la muzik-gustoj en tiuj du landoj ŝajnas tre similaj. Ĉi-jare la kantoj de Grekio kaj Turkio estis preskaŭ identaj. Identite kretenaj por posedanto de nordia muzik-gusto. Kaj Turkio montris sin pli pacama (4 poentoj) ol Grekio (0 poentoj).

Iom dise de tiu dupolusa interpreto ŝajne staras Iberio, kies muzik-gusto klare havas ion komunan kun orienta Eŭropo. Portugalio donis la maksimumajn 12 poentojn al Ukrainio kaj 10 poentojn al Moldavio, dum Hispanio donis 12 poentojn al Rumanio, 10 poentojn al Bulgario kaj 8 poentojn al Armenio.

Antaŭe la orienteŭropaj landoj (kiuj nun nomas sin centreŭropaj) ne partoprenis en la konkurso de Eurovision, sed havis sian propran konkurson. Nun ili ne nur partoprenas, sed krome la kvanto de sendependaj landoj en la orienta parto de Eŭropo kreskis. La loĝantoj en tiuj landoj, ne mirinde, ofte sentas proksimecon kun (iuj el)



(Foto: YLE)

siaj najbaroj, kaj tio evidentiĝas ankaŭ dum la voĉdonado.

En Svedio jam anticipe aperis multaj plendoj pri “la orienteŭropa kantkonkurso”, kaj postuloj, ke oni rekonsideru la regulojn, por ke orienta Eŭropo ne komplete superregu estonte. En Estonio pri la temo esprimis sian opinion eĉ la prezidanto de la parlamenta komisiono pri EU-aferoj, la dekstra politikisto Marko Mihkelson. Li asertis, ke la konkurso en sia nuna formo pli dividas ol unuigas Eŭropon, kaj demandis, ĉu indas, ke Estonio (kies kanto ja ne atingis la finalon, ricevinte seriozajn poentojn nur de Latvio, Litovio, Finnlando kaj Danio) entute plu partoprenu en la konkurso.

El alia vidpunkto oni povus ĝoji, ke la popoloj de eksa Jugoslavio, spite la kruelajn militojn de la 90-aj jaroj, nun evidente sentas ian komunekon. Ja la kanto de Serbio ricevis la pintajn 12 poentojn de Bosnio, Kroatio, Makedonio, Montenegro kaj Slovenio.

Interesa estas ankaŭ la fakto, ke ĝuste en la Balkana regiono la fina venko de la angla en la muziko evidente ankoraŭ ne proksimas. Iom surprize, la gajninta serba kanto “Molitva” (“Preĝo”) cetere krom la serba estas registrita ankaŭ en angla, rusa... kaj finna versioj, kun tekstoj iom malsamaj de la originalo.

La kanto estas bona, sed aŭskultante la finnan version mi subite povas imagi, kiel devas senti sin anglalingvanoj. Kia beno, ke la finna verŝajne ne riskas iĝi mondlingvo, kaj mi ne devos ĉiutage aŭdi ĝin mistraktata de mallertaj alilingvanoj. Sed kompreneble estus aliaj avantaĝoj... eble tamen?

Kalle Kniivilä

Asembleo 2007 de la Esperanta PEN

La Esperanta PEN-Centro havos sian ordinaran Asembleon en Ĉaudefono 22 aŭgusto 2007. En la tagordo plej rimarkindaj estas la punktoj pri la aranĝoj en 2008 kaj la elektoj de la novaj Komitato kaj revizoroj.

Rilate al la dua, pretas rekandidatigi c-anoj Giorgio Silfer kaj Ljubomir Trifonovski. Rilate al la unua, gravas la partopreno de esperanta delegacio en la unua internacia kongreso de literaturaj tradukistoj (WALTIC) kaj la organizo de europa PEN-konferenco en Svislando.

La esperanta centro, kvankam malgranda kaj malriĉa, estas tre aktiva kadre de PEN Internacia, pli ol multaj reprezentantaj eĉ gravajn literaturojn. Fakte nia PEN-centro estas efika ambasadoro de la esperanta literaturo, kaj ĝia vicprezidanto, c-ano Silfer, unu el la plej aprezataj delegitoj en la monda asembleo.

Ĉi-jare en Dakaro la PEN-mondkongreson partoprenos ĝec-anoj Marie-France Conde Rey, Gbeglo Koffi, Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer.

(el HeKo prenis mm)

Estraro de UEA fine de sia periodo

La Estraro de UEA, elektita en la Pekina UK en 2004, havis en Roterdamo de la 13-a ĝis la 15-a de aprilo sian lastan ordinaran kunsidon antaŭ la fino de sia mandato je ĉi-jara UK.

La buĝeto de 2006 antaŭvidis negativan saldon de 8650 eŭroj, sed la fina minuso estas nur kelkcent eŭroj. Por la jaro 2008 oni proponas plene ekvilibran buĝeton. La Estraro enoficiĝis fronte al deficino de 57194 eŭroj en 2003 kaj povas do kalkuli la financan resanigon de la Asocio inter siajn ĉefajn atingojn.

Oni konfirmis la konsiston de la Loka Kongresa Komitato de la 93-a UK en Roterdamo (19-26 julio 2008) kun Ans Bakker-ten Hagen kiel prezidanto. La estraranoj diskutis pri la

temo de tiu UK. Ĉar en 2008 oni festos la 100-jariĝon de UEA kaj ĉar ĝi estos Internacia Jaro de la Planedo Tero, oni klopodas kunigi ambaŭ aferojn sub la temo.

La elektado de la loko por la UK en 2009 proksimiĝas al la fina decido. La Estraro definitive, ke ĝi okazos en Pollando por festi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof. La fina elekto okazos en Jokohamo inter Bjalistoko kaj Poznano.

Al la eldonserio Oriento-Okcidento estis akceptita nova titolo, "Maitreyi" de la granda rumana verkisto Mircea Eliade, aperonta ĉe la eldonejo Bero. La 23-a okazigo de la fama Esperanto-aranĝo ARKONES en Poznano (21-23 septembro 2007) ricevis aŭspiciojn de UEA.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Esperanta kolokvo pri planlingvaj bibliotekoj

en la Aŭstria Nacia Biblioteko dum oktobro 2007, Vieno

Nia planlingva spirita heredaĵo estas konservata en bibliotekoj kaj arkivoj. Ĉi-rilate bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj, tro ofte nekonsciataj. Pro tio la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, aranĝos kun la subteno de UEA internacian kolokvon en Esperanto je la temo "Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj".

La kolokvo okazos la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la Esperantomuzeo, Palais Mollard, Herrengasse 9, A-1010 Vieno. La celo de la kolokvo estas prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diverstipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj.

Kotizo: 45 e, reduktite 30 e

Pliaj informoj ĉe: esperanto@onb.ac.at

*Kathrin Delhougne
Sammlung für Plansprachen
und Esperantomuseum
der Österreichischen Nationalbibliothek*

La “Familia Esperanto” renaskiĝis

Post dujara interrompo reaperis “Familia Esperanto” sub la sceptron de nova redaktoro, Claude Rouget el Norvegio. “Familia Esperanto” estas oficiala organo de Rondo Familia de UEA. La nova numero estas kolore ilustrita kaj 20-paĝa kaj legebla en la retejo de Rondo Familia, http://uea.org/rondo_familia, kie oni povas legi ankaŭ ĝiajn antaŭajn numerojn. Por familioj, kiuj ne havas aliron al komputiloj kaj reto, oni konsideras ankaŭ paperan eldonon. Por ebligiton subtenaj kotizoj de 10 EUR aŭ pli estas bonvenaj al la UEA-konto idoj-p de la Rondo.

Rondo Familia estis fondita en 1994, la Internacia Jaro de Familio, por ligi esperantistajn familiojn. Ĝi registras familiojn kun aŭ sen infanoj, sendepende de ilia movada engaĝiĝo.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Jubilea simbolo por 100-jara UEA

En 2008 Universala Esperanto-Asocio estos 100-jara. Por ekhavi grafikan identigilon, la Estraro de UEA lanĉis konkurson pri jubilea simbolo.

La serĉata simbolo emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la daŭran aktualecon de ĝiaj celoj, estu elvoka, simpla kaj uzebla presite kaj elektronike. Ĝi estu unukolora aŭ plurkolora sed ankaŭ unukolore uzebla. La simbolo estos uzata nur lige de la 100-jariĝo kaj ne anstataŭos la ĝeneralajn simbolojn (verda stelo, simbolo de la Jubilea Jaro 1987 k.a.).

La gajninto ricevos premion de 500 eŭroj. La rajtoj pri la premiita konkursaĵo, inkluzive de ĝia eventuala adapto, apartenos al UEA. Pri la aljuĝo decidis la Estraro de UEA. Oni sendu la konkursaĵojn ĝis la 30-a de junio 2007 al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; aŭ rete al simbolo@co.uea.org.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Teatra respondo al “Kazaroza”

Ne nur sur la televida ekrano oni nuntempe povas vidi rolantojn-esperantistojn. La stafeto intertempe transiris al unu el la plej konataj teatroj de Rusio: teatro-studio de Tabakov.

La 27-an de aprilo 2007 ĝi premiere prezentis spektaklon laŭ nefinita romano de Andrej Platonov “Rasskaz o schastlivoj Moskve” (Rakonto pri feliĉa Moskvo). Unu el la ĉefrolantoj de la verko – kaj la spektaklo – estas esperantisto Bojko.

En la romano Platonov uzis la saman metaforon, kiun poste utiligis Juzefoviĉ en “Kazaroza” – esperantisto estas idealisto, kiu forgesas pri la reala vivo, revante pri la feliĉigo de la homaro. Esperantisto Bojko arde dediĉas sin al tutmonda korespondado kun malproksimaj samideanoj kaj preteratentas la proksiman romantikan junulinon kun la neordinara nomo Moskvo. Sed ĝuste pro tio ŝi lin amas.

Pli detale pri la spektaklo legu ĉe <http://tabakov.ru>

La spektaklo regule prezentiĝos dum la proksimaj monatoj sur la scenejo de “Tabakerka”, la biletoj kostas de 300 ĝis 1500 rub.

Andrej Grigorjevskij

Paŭlo Moĵajev nova redaktoro de Kontakto

Per komuna decido de la estraroj de TEJO kaj UEA Pavel (Paŭlo) N. Moĵajev el Ukrainio transprenos de Ĵenja Amis la redaktorecon de “Kontakto”. Ĵenja Amis estas redaktoro de la socikultura revuo de TEJO ekde 2002. Post pli ol kvinjara sukcesa kaj multe laŭdata laborado ŝi laŭgrade transdonos la respondecon al sia posteulo ĉi-jare.

Paŭlo Moĵajev naskiĝis en 1981 kaj diplomigis en 2003 en la Krimea Ŝtata Medicina Universitato en Simferopolo, kie li nun estas instruisto pri anatomio.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Venu al Valamo – la unuan aŭ la okan fojon

*Esperanto-kurso en la Popola Instituto de Valamo 23.-27.7.2007
kaj vizito antaŭ Arta Lumo 26.-27.7.2007*

La oka kursosemajno kun tradiciaj kaj novaj spertoj atendas vin ankaŭ nun dum la jubilea jaro. Ĝis nun aliĝis deko da personoj, kiuj partoprenos aŭ la tutan semajnon aŭ vizitos antaŭ festivalo Arta Lumo. En Esperantolehti 1/2007 aperis kursosemajnaj informoj, kiun vi ankaŭ trovas el nia TTT-paĝo www.esperanto.fi. La detalan programon kaj informojn pri kotizoj kun aliĝilo vi povas peti de Tiina Oittinen, kurso- gvidanto kaj EAF-sekretario.

Bonvenon kaj novuloj kaj spertuloj de la lingvo kaj de Valamo-vizitado!

Kursokotizo

Prezo de la kursosemajno estas 215 eŭroj, kroma nokto 35 e (2-lita ĉambro kun duŝo kaj necesejo; en 1-lita ĉambro 255 e, kroma nokto 60 e), prezo enhavas instruadon, tranoktadon, festan vespermanĝon kaj kafon/teon dum taga ekskurso. Aliaj manĝoj haveblaj en favoraj studentaj prezoj.

Tervetuloa Valamoon – ensimmäistä tai vaikka kahdeksatta kertaa

*Esperantokurssi Valamon kansanopistossa 23.-27.7.2007
ja vierailu ennen Arta Lumo -festivaalia 26.-27.7.2007*

Valamon kansanopistossa järjestetään esperanton kielikurssi nyt jo kahdeksatta kertaa. Tähän mennessä ilmoittautuneita on kymmenisen, heistä osa on koko viikon, osa tulee vierailulle ja matkustaa yhdessä kurssilaisten kanssa Kuopioon. Esperantolehdestä nro 1/2007 oli tarkempia tietoja kurssista ja samat tiedot ovat luettavissa nettisivuiltamme www.esperanto.fi. Viikon ohjelman kurssihintoineen voit pyytää joko Valamosta suoraan tai kurssivastaava Tiina Oittiselta, joka on myös liiton sihteeri. Tiinan yhteystiedot ovat sivulla 2.

Tervetuloa niin uudet kuin vanhat Valamon kävijät!

Kurssimaksu ja ilmoittautumiset

Kurssin hinta on joko 215 e/2 hh tai 255 euroa/1 hh (lisäyö 35/60 e). Majoitus on opistohotellissa, jossa huoneissa suihku ja wc. Hintaan sisältyy opetuksen ja majoituksen lisäksi juhlaillallinen viimeisenä kurssi-iltana sekä retkikahvit. Muita ruokailuja varten opiskelijat voivat lunastaa kurssiruokailupaketin. Ilmoittautumisen yhteydessä kerro haluatko alkeisiin vai jatkoon. Ilmoittautuminen: Valamon kansanopisto, myyntipalvelu puh. (017) 570 1504 tai 570 1505, sähköposti: opisto@valamo.fi, osoite: 79850 Uusi-Valamo.

Stipendioj haveblaj ia. por esperantokurso en Valamo

Ankaŭ ĉi-jare eblas peti de EAF malgrandan stipendion ekzemple por partopreno en Valamo-kurso aŭ en alia aranĝo de EAF. Sendu vian liberformulitan peton – kun informoj kial ĝuste vi estus bona ricevanto – al stipendirespondeculo de EAF, Päivi Saarinen, kontaktinformoj sur paĝo 2. Ne gravas ĉu vi jam aliĝis al la kurso aŭ ne. Limdato estos fine de junio (30.6.2007).

Stipendejä mm. Valamon esperantokurssille

Suomen Esperantoliitolla on jälleen mahdollisuus myöntää stipendejä esim. Valamon esperantokurssin osallistujille. Stipendejä voi anoa myös muihin liiton järjestämiin tapahtumiin. Lähetä vapaamuotoinen hakemus ja kerro perusteluissa miksi juuri sinä olisit hyvä stipendinsaaja. Hakemuksen voi lähettää riippumatta siitä onko jo ilmoittautunut kurssille tai tapahtumaan. Hakemukset 30.6.2007 mennessä liiton stipendivastaavalle Päivi Saariselle, yhteystiedot sivulla 2.

EAF-estraro – hallitus

Eventokalendaro de EAF

Jubilea jaro 2007

- 23–27.7.2007 Esperantokursoj – Esperantokurssit (Valamon kansanopisto)
- 26–27.7.2007 Antaŭekskurso de monaĥejo ĝis Kuopio
- 27–31.7.2007 Esperantokurssit, Kuopio
- 27.7–1.8.2007 Festivalo Arta Lumo, Kuopio
- 27.7–3.8.2007 Internacia Junulara Kongreso, Hanojo, Vjetnamio (TEJO)
- 4–11.8.2007 Universala Kongreso, Jokohamo, Japanio (UEA)
- 5–7.10.2007 Simpozio “Finnlando, Esperanto kaj pluraj lingvoj praktike”, Vaasa–Vasa
- 15.12.2007 Malferma tago en la oficejo, Helsinko

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 5.-7.10.2007 en Vaasa.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo (inkluzivas ankaŭ simpozion vendrede):

14e ĝis 15.8.2007 _____

18e ĝis 20.9.2007 _____

21e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

AT-paketo: informoj aperos en sekva EF, no 4/2007. En TTT-paĝoj de EAF informoj estos publikitaj tuj kiam ili estos konfirmitaj.

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825. Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informoj en pagilo).

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65
FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 5.-7.10.2007 Vaasassa

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu:

14e 15.8.2007 saakka _____

18e 20.9.2007 saakka _____

21e 20.9.2007 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Syyspäivien **AT-paketin** tiedot ilmestyvät seuraavassa lehdessä (nro 4/2007). Liiton verkkosivuilla tiedot julkaistaan heti kun ne on vahvistettu.

Tilinumero: Sampo 800017-230825.
Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia:

Lähetä lomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65
FI-00530 Helsinki
tai tiedot s-post. eafmendoj@esperanto.fi

Simpozio kaj Aŭtunaj Tagoj: **Finnlando, Esperanto kaj pluraj lingvoj praktike**

5-7 oktobro 2007
en la dulingva urbo Vaasa/Vasa

Esperanto-Asocio de Finnlando invitas al simpozio kun la temo "Finnlando, Esperanto kaj pluraj lingvoj praktike". Samtempe realiĝas niaj tradiciaj Aŭtunaj Tagoj. Por la sama kotizo kiel kutime eblas partopreni programon jam la vendredan tagon, sed same bone eblas alveni vendrede vespere aŭ sabate.

La simpozio traktas la rolon de Esperanto en Finnlanda kaj plurlingva kunteksto, sed ankaŭ ĝenerale la uzon de pluraj lingvoj ĝenerale. La fokuso estas je la praktikaj aspektoj de plurlingveco, ekz. dulingva administrado de la urbo aŭ edukado de infanoj.

Kontribuos kaj partoprenos esperantistoj kaj neesperantistoj interalie de la du lokaj universitatoj (Vaasan yliopisto kaj Åbo Akademi). De eksterlando venos esperantistaj fakuloj kaj ankaŭ Jomo, kiu estas konata ne nur de "Jomo kaj la liberecanoj", sed ankaŭ kiel kantisto en multaj lingvoj. Li ofte kantis en la Lingva Festivalo en Ĉeboksari, kies koncepton vi povos sperti dum la eta festivalo, kiu estas parto de la programo. Vi povos konatiĝi kun diversaj lingvoj dum mallongaj prezentoj kaj aŭdi kantojn en pluraj lingvoj.

Ne necesas paroli Esperanton por sekvi la programon ĉar ankaŭ la finna kaj sveda estas laborlingvoj, tamen tiel ke ni ne organizos tradukojn inter tiuj du lingvoj. La programo realiĝas laŭ trilingva nesimetria lingvoreĝimo kun Esperanto kiel la ĉefa lingvo.

La simpozio realiĝas kadre de la jubilejara temo “Pluraj lingvoj praktike” por kiu EAF ricevis subvencion de Svenska kulturfonden (Sveda fondaĵo de Finnlando).

Sekvanumere informoj pri loĝado kaj manĝo-paketoj – kaj kompreneble pri la programo. Informoj aperos ankaŭ en la retlisto EAF-agadas por finnaj esperantistoj (groups.yahoo.com/group/EAF-agadas, aŭ kontaktu la prezidanton kaj ŝi aldonos vian retadreson).

Bonvenon!



Symposiumi:

Suomi, esperanto ja käytännön monikielisyys

5.–7. lokakuuta 2007

kaksikielisessä Vaasan kaupungissa

100-vuotias Suomen Esperantoliitto toivottaa tervetulleeksi kolmikieliseen symposiumiin. Esperantontaitoja ei tarvita jos pärjää molemmilla kotimaisilla. Luennoitsijoina sekä suomalaisia että ulkomaalaisia asiantuntijoita. Ohjelmaan kuuluu myös kielifestivaali.

Lisätietoja seuraavassa Esperantolehdessä tai puheenjohtajalta: Anna Ritämäki, ea prezidanto@esperanto.fi, 050-3793146.

Tervetuloa!

Symposium:

Finland, esperanto och flerspråkighet i praktiken

5-7 oktober 2007

i tvåspråkiga Vasa stad

100-åriga Esperantoförbundet i Finland inbjuder till ett trespråkigt symposium som är en del av förbundets jubileumstema “Flerspråkighet i praktiken” som stöds av Svenska kulturfonden. Esperantokunskaper krävs ej för dem som klarar sig på båda inhemska. Föreläsarna kommer både från Finland och utomlandsifrån. Också en språkfestival hör till programmet.

För kontaktinformation se den finska texten.

Välkommen!



Ŝildaj ilustraĵoj el la kolekto de Kjell Herberts, esploristo ĉe la instituto por finnlandsveda socia esplorado (Institutet för finlandssvensk samhällsforskning).

Estraro kunvenis

La estraro kunvenis (4/2007) 31.3.2007 je 11.20-15.45 en la oficejo, ĉeestis: AR, TO, BE, TH, PS, MA, OP.

La estraro konstatis kaj elektis la funkciulojn kaj la komisiitojn de EAF, konstatis la ŝlosilhavantojn de la oficejo, regularojn kaj konstantajn decidojn. La nova estraro konfirmis la decidon pri jubilea monkollekto de la antaŭa estraro, do eblas starigi kolekton por subteno de Esperanta kulturo [sed la formalajoj pri tio ne estis finplenumitaj].

La estraro pritraktis la leteron de la revizoroj pri la jaro 2006 kun notoj kaj konsiloj pri la financa mastrumado de la asocio.

Vintraĵ Tagoj en Kotka havis 58 partoprenantojn. Ŝajnas, ke la Vintraĵ Tagoj rezultigis bonan gajnon speciale pro donaco pro kiu la asocio estas dankema. Krome la aŭkcio por la jubilea kaso alportis 410 eŭrojn.

La unua mendo de la jubileaj poŝtmarkoj alvenis kaj la estraro decidis tuj mendi pliajn.

La estraro notis kelkajn aferojn pri Esperanto-lehti (EF): 200 pliaj ekzempleroj de EF 1/2007, la aperoj de aprila kaj jubilea numero kun speciala anonctarifo, pri transiro al ekspedado de la gazeto fare de la presejo post longa, dediĉita laboro de Pentti Makkonen, pri ebla transiro al alia presejo kaj pri la retpaĝoj de EF.

La estraro traktis la preparojn por la jubilea tago (invitado, vizito de Corsetti, gazetara komunikado, tombeja vizito, jubilea festo, konfirmo de retpoŝta decido pri la okazigo de la bankedo en restoracio Pörssitalo, konfirmo de artistoj, kvizaj planoj, rabato por esperantistoj en restoracio).

EAF donacis unu senpagan partoprenon en la jubilea festo kaj en la bankedo al la 30-jara FEJO.

Pro la malalta nombro de aliĝantoj al Arta Lumo en Kuopio 27.7.-1.8.2007 la estraro decidis ŝovi la unuan limdaton ĝis 30.4.2007. Informilo pri la festivalo estis presita koste de EAF en Pollando por distribuo kun La Ondo de Esperanto.

La estraro konfirmis la retpoŝtan decidon pri anonco en la Jarlibro 2007.

La estraro informiĝis pri la kampanjo pri kandidatigo de UEA por Nobel-premio pri paco por 2008 (okaze de la centjariĝo de la fondo de UEA). UEA petas la landajn asociojn instigi personojn kun rajto kandidati, ekz. parlamentanoj, profesoroj, sed la estraro de EAF ne trovis solvon kiel realigi tion. Kandidatigantoj devas sendi la kandidatigojn al la Nobel-komitato ĝis la fino de septembro 2007.

UEA-estrarano pri landa agado, s-ino Gutierrez, demandis de la membroasocioj pri ideoj por alternativaj honorigoj krom elekto de honoraj membroj. EAF havas la sistemon de Aganto de la jaro, pri kiu la prezidanto sendis informan retpoŝton al s-ino Gutierrez, kiu disvastigis la ideon kiel ekzemplon por aliaj.

Kiel komitatano A de UEA por EAF reelektiĝis Anna Ritamäki. La estraro informiĝis, ke Jukka Pietiläinen estis reelektita B-komitatano de UEA.

La estraro notis la planatan jarkunvenon de la UN-asocio en Helsinko 26.4.2007 kaj la tiuligan seminarion. [Parton de la seminario partoprenis Renato Corsetti kun la sekretario, komence ankaŭ la prezidanto.]

La estraro decidis konservi la filmon faritan de Vilho Setälä. La filmo nomiĝas Pilgrimo-Toivioiretki.


Taneli Huuskonen donacis al la oficejo komputilon, sian malnovan.

Nebula ekskurso en Vääksy



Esperanto-klubo de Jyväskylä organizis ekskurson al Vääksy, kie oni konatigis kun akvomueleja muzeo kaj aliaj pejzaĝoj apud la kanalo. (tekstoj kaj fotoj de mm)

Sur la monto Aurinkovuori oni sukcesis rosti kolbasojn ĉe fajro, kvankam oni preskaŭ devis ŝirmi la fajrolokon per ombreloj kontraŭ la pluvo.



Pejzaĝe Aurinkovuori, "Sunmonto", iĝis nur nebulmonto, sed la kverkoj, kiel jen en la bildo, pravas, ke la loko almenaŭ havas mildan veteron por situi norde de Lahti, ĉar kutime kverkoj kreskas en Finnlando nur sur malvasta zono apud la suda marbordo.

FEJO elektis

La estraro de FEJO havis kunsidon kaj sin ordigis la 28-an de aprilo. Sekve FEJO krom en jarkunsido elektita prezidanto Mira Anonen havas nun la sekvajn responsulojn: Vicprezidanto Andrei Dumitrescu, kasisto Paula Niinikorpi, sekretario Patrik Austin, TTT-prizorganto Mikko Mäkitalo, Diskejo-prizorganto Patrik Austin, instruado-prizorganto Patrik Austin, Bulteno-prizorgantoj Patrik Austin kaj Mira Anonen, A-komitatano en TEJO Mira Anonen, retroŝtlista prizorganto Patrik Austin.

Malferma Tago someris

Kun pli ol 90 vizitantoj el 15 landoj la Centra Oficejo de UEA spertis nekutime multnombre vizitatan “printempan” Malferman Tagon sabaton, la 2-an de junio. Pro la rekonstruado en la oficeja domo tiu ĉi aranĝo, organizita jam por la 26-a fojo, okazis pli malfrue ol kutime kaj fariĝis fakte somera Esperanto-aranĝo.

La ĉefa gasto Claude Piron iom provokteme prelegis: “Ĉiuj neesperantistoj estas afaziuloj”. Lucas Vignoli Reis el Brazilo prelegis kun sonaj kaj bildaj specimenoj pri la muziko de sia lando. Yves Nevelsteen kaj Petro Balaz enkondukis la publikon en la retan enciklopedion Vikipedio. La tutan tagon estis ankaŭ montrataj Esperanto-filmoj. Surpriza aldono al la programo estis la flamenka versio de “La espero” fare de Solo.

La plej furora libro estis la ĵus aperinta “Afero de espero: Konciza historio de la Esperantomovado en Afriko” de Heidi Goes, kiun la aŭtorino mem prezentis kadre de la programo, en 17 ekzempleroj. “Maks kaj Moric” iĝis aĉetita de germana ŝatanto de tiu infanlibra klasikaĵo en 15 ekzempleroj kaj atingis surprizan duan lokon. De “Vikipedio: praktika manlibro” estis vendita 9 ekz.

La venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo okazos sabaton, la 24-an de novembro 07.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Selten en la EU-Parlamento

Dekduo da Nobel-laŭreatoj honore gastis ĉe la solena sesio de la EU-Parlamento okaze de la Eŭropa Tago, 9 majo 2007. Inter ili ankaŭ esperantisto: Reinhard Selten.

Ĉiu laŭreato prenis la parolon, laŭ invito de la parlamenta prezidanto, Hans-Gert Pöttering. Intervenis ses pac-Nobelaj, du medicinaj, du fizikaj kaj unu ekonomika, nome Selten.

Laŭ la EU-agentejo, “Prof. Reinhard Selten kungajnis la Nobel-premion pri ekonomiko en 1994 pro siaj kontribuoj pri la ludoteorio. En sia hodiaŭa parolado li prilumis la sukceson de ekonomia kaj mona unuiĝo kaj emfazis la gravecon preventi la sendependecon de la Eŭropa Centra Banko. Li aldonis ke la ĉefa obstaklo al la eŭropa identeco estas la lingva problemo, argumentante ke la respondo ne estas la regado de unu nacia lingvo, sed ke ĉiu lernu esperanton.”

(el HeKo prenis mm)



Centjariĝo. Kaj kion plu?

Rondo familia de Finnlando la 28 de aprilo festis sian centjariĝon. Certe estis prezentitaj atingoj kaj ricevitaj bondeziroj. Kaj nun ja venis tempo plu evoluigi la laboron surbaze de atingoj de la pasinta jarcento.

La unua jarcento estis plejparte dediĉita por ĝui la lingvon, multobligi kvanton de la rondetoj kaj kunigi ilin en grandan tutmondan rondon familian. Kaj tiaj zorgoj nature estas plu daŭrindaj. Sed nova tempo aktualigas ankaŭ novajn taskojn kaj novajn zorgojn.

Jam venas bezono larĝigi utilportan sferon de lingvouzo. Manko de tiu farus ajnan lingvon malperspektiva.

Solvante taskojn de la unua jarcento, la Movado esence zorgis pri sia reproduktado. Tion unuavice konfirmas strukturo de rilatoj. Ĉi-strukturo estas simila al tiu, kia estas ĉe amatoraj kolektivoj.

La tempo postulas, ke el la familia rondo kresku vera Esperantujo kun ĉiuj atributoj de ŝtato. Kaj tiu ŝtato zorgu interesojn de la tuta monda esperantistaro. Estas certe, ke ĉiu esperantujano devas havi konforman (duan) civitanecon kaj pasporton.

Ĉu povos dum sekva jarcento realiĝi tiu ĉi ideo, aŭ ne, tion montros la tempo. Sed la Movado jam nun devas turni sin vizaĝe al direkto de tiuj personoj, kiuj pro tiuj aŭ aliaj kaŭzoj plu ne havas eblon amatore aktivi en la Movado.

Oni ja konas multajn el tiuj, kiuj pro sia okupiteco plu ne povas aktivi, sed anime restadas

esperantistoj kaj, tiel aŭ aliel, uzas influon de Esperanto en sia ĉiutaga vivo. Ĉu la rondo familia nepre devas forgesi siajn maturiĝintajn gefilojn, kiuj elflugis el siaj nestoj? Ja ilia sperto pri utila uzo de la lingvo povus fariĝi almenaŭ bona agitado por Esperanto. Sendube legantoj de ĵurnaloj kaj revuoj devas ricevadi pli multan informon pri la homoj, kiuj okupiĝas en sferoj de utilondona uzo de la lingvo. Eĉ la homoj, kiuj uzas la lingvon nur por propra utilo, ekzemple, por turismi, povus prezenti interesan informon al gejunuloj, kiuj ankoraŭ ne fariĝis esperantistoj.

En la pasinta jarcento en centro de la atento estis aktivuloj (instruistoj, organizantoj, artistoj, verkistoj) kaj ankaŭ homoj ĝuantaj la lingvon kaj ricevantaj moralan rekompencon de tio. Sed en la nova jarcento ni aparte zorgu pri homoj, kiuj aldone ankaŭ evoluigas la lingvon. Por mi persone estus interese, ekzemple, scii pri sperto de personoj, kiuj uzas Esperanton por fariĝi poligloto, aŭ kiuj uze de Esperanto faciligas lernon de iu alia lingvo. Kaj en sfero de tiuj interesoj aparte interesa estas la libro de Bertilo Wennergren "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko". Tiu ĉi libro ja estas siaspeca unua paŝo al nova tutmonda lingva gramatiko. Ĝi estas deca aldono al jam inventita komuna lingvo.

En nova jarcento ni nepre devas plani pli densan uzon de Interreto. Kaj ŝajne la esenca sperto pri tio jam estas. Ne sole temas pri la Interreta diskutgrupo de EAF, sed ankaŭ pri kontraŭvirusa programaro de firmao "Doctor Web", kiu nun aldone ricevas fare de nia iniciato finnan lingvon (por interlanda uzo) kaj Esperanton (por uzo en landoj, kie oni ne uzas la anglan).

Same estas tradukita en Esperanton interreta paĝo www.drweb.fi, kie oni povas ricevi informon pri uzo de la programo kaj pri ĝiaj eblecoj. Espereble la iniciaton aprobas kaj subtenos esperantistoj kaj unuavice landaj samideanoj.

Evo Luonto, 29.04.2007

◁ *Andreo Teräväinen estas partnero de Dr. Web, granda rusa firmao, kiu produktas kontraŭvirusan kaj komputilsanigan programon. La retpaĝo nun ekzistas ankaŭ en Esperanto: www.freedrweb.com. Li disdonis kuponojn por senpaga uzo de la pagita versio de la programo dum Vintraj Tagoj en Kotka kaj estas atingebla rete per: palvelu@drweb.fi*

Mendu tranoktejon TUJ!

Por ricevi tranoktejon laŭ via prefero: Mendu TUJ! Rezervu vian ĉambron antaŭ la 27a de junio!! Post tiu dato vi povas informiĝi ĉe ni sed ni ne povas ion garantii (krom amasloĝejon).

La hotela kapacito de Kuopio estas aparte streĉita dum la semajnfino pro la Farmari-foiro.

La tranoktejoj prezoj troviĝas sub Kotizoj. Ankaŭ partatempaj partoprenantoj povas mendi pere de ni. Demandu!

Hotelo Cumulus

Puijonkatu 32, Kuopio

Situo: En la centro: 100 m al la fervoja stacidomo, 200 m al la autobusa stacidomo, 500 m al la vendoplaco, 800 m al Muzikcentro

Pliaj informoj: www.restel.fi

Best Western Hotel Atlas

Haapaniemenkatu 22, Kuopio

Situo: En la centro ĉe la vendoplaco

Pliaj informoj: www.bestwestern.fi

Baneja hotelo Rauhalhti

Katiskaniementie 8, Kuopio

Situo: ĉe la lago Kallavesi, 5 km sude de la urbocentro, en la libertempa areo de Rauhalhti Ĉambroj en la baneja hotelo mem kaj en la nova apartementtipa hotelo 100 metrojn for de la hotelo. La prezoj inkluzivas bufedan matenmanĝon kaj uzon de la banejo.

Pliaj informoj: www.rauhalhti.fi

Turisma centro

Rauhalhti / Kampadejo

Situo: ĉ. 6 km sude de la urbocentro, rekta konekto al la urbo per loka autobuso numero 16 Bone ekipitaj feriaj vilaoj kaj dometoj por 4-6 personoj. Pliaj informoj de la aranĝantoj.

Lerneja tranoktejo (amasloĝejo)

Situo: En la urbocentro, apud la Muzikcentro. Modesta, kunportu dormosakon aŭ similan.



Risto Metsänen 1924 – 2007

Lia mondo ne havis limojn. Elektroteknikisto, li laboris ĉe la mallongonda sendilo de Finna Radio en Pori, pioniris pri la televido, kaj servis kiel la unua estro de la TV-radio-stacio en Eurajoki 1964–1984.

La milito ŝparis, kvankam vundis la junulon, kiu interesiĝis pri astronomio, lingvoj kaj klasika muziko. Esperantaj radioamatoroj ofte parolis kun Risto. Kun edzino Auli li partoprenis kelkajn esperantajn eventojn.

Ni dividis la funebro de la vidvino kaj la filo kun familio.

Tuomo Grundström

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki
jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530
onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609
kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. martti.pennanen@phnet.fi
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. <http://esperantooulu.info/>
olli.pajula@baanamail.fi
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Eero Saari) Kössinkatu 2 as 7, 24100 Salo. ☎ (02) 735 6130
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528
markku.saastamoinen@jippii.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimito. cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2007 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnassa on perustettu uusi yhdistys, Verda Kastelo R.Y. – Esperanto-Societo en Hämeenlinna, joka ei vielä ole EAF:n jäsenjärjestö. Yhteystiedot: Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna.
verdakastelo@gmail.com

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2007**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
4	10.7.	15.7.	5.8.
5	10.9.	15.9.	5.10.
6	10.11.	15.11.	5.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Jam jarcenton

*En Finnlando ekblovinta
estis nova vento,
lumis verda stel' kvinpinta
sur la firmamento.
Stelo brile korojn tuŝis,
flustris vent' defion,
aŭskultantojn kunen puŝis
krei asocion.*

*Jam jarcenton post la fondo
agis tiu ligo
por justeco en la mondo
kaj por plipacigo,
por ke eblu al najbaroj,
vivo sen subpremo,
ĉie falu lingvaj baroj,
regu komprenemo.*

*Nun post jam generacioj
estas vico nia
zorgi pri la tradicioj
kaj laboro plia.
Ni rigardu al la stelo
aŭdu ventokanton,
strebu al la sama celo,
gardu Esperanton!*

*Poemo de Anja Karkiainen el la jubilea libro.
Laŭtlegita en la jubilea festo je "Libera tribuno"*

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuussa. Jutut 15.7.2007 mennessä EAF:n toimistoon. La venonta numero aperos en aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2007 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafllehti@esperanto.fi>.

Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2007